

Fabelo de Andersen: Birdo Fenikso



En la ĝardeno de la paradizo, sub la arbo de la sciado, staris rozarbetaĵo; ĉi tie, en la unua rozo, naskiĝis birdo, kiu per sia flugado povis konkuri kun la lumo kaj kies koloroj estis admirindaj, kies kantado estis belega.



Sed kiam Eva deŝiris la frukton de la sciado, kiam ŝi kaj Adam estis elpelitaj el la ĝardeno Eden, tiam de la flamanta glavo de la kerubo falis fajrero en la neston de la birdo kaj ekbruligis ĝin. La birdo mortis en la flamo, sed el la ardanta ovo ekflugis nova, la sola, la ĉiam sola birdo fenikso. La legendo diras, ke tiu birdo havas sian neston en Arabujo kaj en ĉiu centa jaro mem sin forbruligas en sia nesto, kaj nova fenikso, la sola en la mondo, elfugas el la ardanta ovo.



**La birdo flugas
ĉirkaŭ ni, rapida kiel
la lumo, admirinda
pro siaj koloroj,
belega en sia
kantado. Kiam la
patrino sidas ĉe la
lulilo de la infano, la
birdo troviĝas apud
la kapkuseno kaj
frapas per siaj
flugiloj, ĝis ĉirkaŭ la
kapo de la infano
formiĝas aŭreolo. Ĝi
flugas tra la ĉambro
de mizero, kaj tiam
tie ekregas sunlumo,
tiam la mizera
komodo ricevas
odoron de violoj.**



Sed la birdo fenikso estas ne sole birdo de Arabujo, ĝi flugas ankaŭ en la brilo de la nordlumo super la glaciaj kampoj de Laplando, ĝi saltetas ankaŭ inter la flavaj floroj en la mallonga somero de Grenlando.

**Inter la kuprahavaj rokoj de Fahlun kaj en la
karbominejoj de Anglujo oni aŭdas la
frapadon de ĝiajflugiloj, kaj ĝi flugas super la
preĝolibro en la manoj de la pia laboristo. Sur
la folio de la lotuso ĝi pelas la sanktan akvon
de la rivero Gango, kaj la okuloj de la Hinda
knabino eklumas, kiam ŝi ĝin ekvidas.**



Birdo fenikso! Ĝu vi ne konas ĝin, la paradizan birdon, la sanktan cignon de la kantado? Sur la ĉaro de Tespis ĝi sidis kiel babilema korvo kaj frapadis per la nigraj feĉogutantajflugiloj. Super la harpo de la Islanda kantisto glitadis la ruĝa sonora beko de la birdo; sur la ŝultroj de Shakespeare ĝi sidis kiel korvo de Odin kaj flustradis al li en la orelon: senmorteco. Dum la festo de la kantistoj ĝi flugis tra la kavalira salono de Wartburg.



Birdo fenikso! Ĉu vi ĝin ne konas? Ĝi kantis al vi la Marseljezon, kaj vi kantis la plumon, kiu elfalis el ĝiajflugiloj; ĝi venis en paradiza brilo, kaj vi eble deturnis vin de ĝi kaj turnis vin al la pasero, kiu sidis kun oritaĵo sur laflugiloj.





**Ho vi paradiza birdo,
ĉiucentjare renovigata,
en flamoj naskata kaj
en flamoj mortanta, via
bildo pendas en ora
kadro en la salonoj de
la riĉuloj, dum vi mem,
ofte erarvaganta kaj
sola, flugas tien kaj
reen, nur legendo:
birdo fenikso en
Arabujo.**

En la ĝardeno Eden, kie vi naskiĝis sub la arbo de sciado, en la unua rozo, Tie Dio vin kisis kaj donis al vi la ĝustan nomon: Poezio.



Aŭtoro: Hans Christian Andersen.

Tradukis: Zamenhof.

Voĉoj: Flávio Fonseca kaj

Cristina Pancieri.

Muziko: Flávio Fonseca.

Registrita en la jaro 2012.



**Ĉi tiu verko apartenas egale al la tuta
Homaro.**

**Oni povas libere kopii kaj disdoni ĉi tiun
sondosieron!**

laŭ

<http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/fabeloj/birdo-fenikso/>



Aranĝo: Liette Lêla